

Joseph M. Scriven ,
Trans imag' Jesu'
amikas

*tradukita de Reinhard
Pflüger*

Trans imag' Jesu' amikas -
kia la privilegi',
ke li portas nian ŝuldon.
Preĝe donu ĝin al li.
Kiom ni disipas ŝancojn
pri anima harmoni',
sole ĉar ni rezignadas
preĝe turni nin al li.

En danĝero kaj aflikto,
tento kaj eĉ tragedi'
ni neniam malesperu.
Preĝe prenu ĝin al li,
la fidela akompano.
Amikec' ne eblas pli.
Konas li malforton ĉian,
preĝe portu ĝin al li.

Zorgoŝarĝo ofte pezas,
kaj senfina la defi'.
Ĉion la Savant' superas.
Preĝe fuĝu ni al li.
Se fortunatas sin amikoj,
preĝe diru ĝin al li.
Vin konsole ĉirkaŭbrakos
la Unika sen kopi'.

Vi, Savant', promesis porti
ŝarĝojn niajn tie ĉi.
Tial ilin ni demetu
ĉiujn preĝe nur ĉe vi.
Baldaŭ preĝoj ne necesos
ĉe la brila tron' de Di'.
Ĝis etern' ni restos rave
en ador' kaj laŭd' al Li.

...

Joseph M. Scriven ,
What a Friend We Have
in Jesus

What a friend we have in Jesus,
All our sins and griefs to bear!
What a privilege to carry
Ev'rything to God in prayer!
Oh, what peace we often forfeit,
Oh, what needless pain we bear,
All because we do not carry
Ev'rything to God in prayer!

Have we trials and temptations?
Is there trouble anywhere?
We should never be discouraged,
Take it to the Lord in prayer:
Can we find a friend so faithful
Who will all our sorrows share?
Jesus knows our ev'ry weakness,
Take it to the Lord in prayer.

Are we weak and heavy laden,
Cumbered with a load of care?
Precious Savior, still our refuge;
Take it to the Lord in prayer:
Do thy friends despise, forsake thee?
Take it to the Lord in prayer;
In His arms He'll take and shield thee;
Thou wilt find a solace there.

Blessed Savior, Thou hast promised
Thou wilt all our burdens bear
May we ever, Lord, be bringing
All to Thee in earnest prayer.
Soon in glory bright unclouded
There will be no need for prayer
Rapture, praise and endless worship
Will be our sweet portion there.

...

Joseph M. Scriven ,
Ho Jesu', amiko
mia

*tradukita de Manfredo Ra-
tislavo*

Ho Jesu', amiko mia,
Kiel alta estas vi!
Estas vi peranto nia,
Kiu ligas nin kun Di'.
Kiom da aflikto devas
Nenecese porti ni,
Se preĝante, Lin serĉante
Ni ne turnas nin al Li.

Kiam la diablo tentas
Nin kun ega energi',
Ni ne devas timi ion,
Se kredeme preĝas ni.
Jen montriĝas la fidelo
De Jesu', nin helpas Li,
Kiel la Savant' potenca.
Tiun preĝe petu ni.

Se ni estas zorgoplenaj
Kaj nin premas tio ĉi,
Certe helpas nin Jesuo,
Niajn preĝojn aŭdas Li.
Se amikoj vin forlasas,
Diru tion nur al Li!
Li vin ŝirmos kaj konsolos.
Nur al Li vin turnu vi.

Ho Savanto, Vi promesis,
Ke Vi portos ja por ni
Niajn ŝarĝojn, ni do portu
Ĉion preĝe nur al vi.
Baldaŭ ni ne devos preĝi
Plu sur tiu Tero ĉi,
Tie ni senfine gloros
Vin en eternec', ho Di'.

...

*Traduko de la Angla poemo "What a Friend We Have in Jesus" de JOSEPH M. SCRIVEN (*1820 - †1886) en Esperanton de Reinhard Pflüger en 2006-08.*

Arg-372-732 (2008-03-30 23:14:41)

Tiu ĉi Esperantigo aperis en la numero 4/2006 de la organo de Kristana Esperanto-Ligo (KELI), en Aŭgusto de 2006.

*Verkinto de tiu ĉi Angla poemo estas JOSEPH M. SCRIVEN (*1820 - †1886).*

Arg-372-726 (2006-08-25 15:58:11)

Tiun originan tekston de la kanto mi trovis en la interreto en / Diesen Urtext des Liedes fand ich im Internetz unter: <http://www.cyberhymnal.org/html/w/a/f/wafwhij.htm>.

*Traduko de la Angla poemo "What a Friend We Have in Jesus" de JOSEPH M. SCRIVEN (*1820 - †1886) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2006-08-24.*

MR-449-1b / Arg-372-727 (2006-08-24 09:22:30)